

*Parto 4:*

*Ido*





## IDO en Svislando

*La komencoj de Ido (I.):* La reformlingvo I. estas la frukto de malfacilaj diskutadoj kaj longaj konsultadoj kadre de *Délégation pour l'adoption d'une Langue Auxiliaire Internationale* (Delegitaro – aŭ Delegacio – por la Alprenado de Internacia Lingvo), kiu estis iniciatita de Louis Couturat kaj Léopold Leau en 1900 dum la Monda Ekspozicio en Parizo kaj starigita komence de 1901. La laboron de la Delegitaro partoprenis signifaj sciencistoj: krom Louis Couturat (1868-1914) mem, franca filozofo-matematikisto kaj Leibniz-eldonisto, ankaŭ la dana filologo prof. Otto Jespersen (1860-1943), la viena fizikisto prof. Richard Lorenz (1863-1929) kaj la germana kemiisto kaj nobelpremiito prof. Wilhelm Ostwald (1853-1932). Kun Léopold Leau (1868-1943), alia signifa franca matematikisto kaj kunfondinto de la Delegitaro, Couturat aŭtoris la epokfaran verkon *Histoire de la Langue Universelle* (1903) kaj *Les nouvelles langues internationales* (1907).

Kvankam Couturat praktike spertis la uzadon de Eo, ĉar li partoprenis la unuan UK en 1905 en Boulogne-sur-Mer, li komencis dubi pri la perfekteco de la lingvo Eo kaj sekve strebis ŝanĝi Eon laŭ siaj imagoj. Por puŝi tiujn reformojn en Eo Couturat klopodis eluzi la prestiĝon de la Delegitaro por proponi alispecan planlingvon kaj ekrilatis kun L.L. Zamenhof por konvinki lin pri la neceso de reformoj en Eo. En tiu senco Couturat diskonigis en 1906 sian projekton *Eo sen supersignoj* (ch anstataŭ ĉ, sh anstataŭ ŝ ktp). Dum pluraj kunsidoj en Parizo en oktobro 1907 la aŭtoroj de la diversaj planlingvaj sistemoj prezentis siajn projektojn. Ĉar L.L. Zamenhof ne povis forlasi Varsovion, estis komisiita Louis de Beaufront (1855-1935) por reprezenti lin kaj Eon. La 24an de oktobro, post la fino de tiuj kunsidoj, la koncerna komisiono de la Delegitaro decidis adopti principe Eon, kun la kondiĉo, ke estu enkondukitaj en ĝi reformoj surbaze de la

konkludoj prezentitaj en la broŝuro kun la titolo *Les vrais principes de la langue auxiliaire* (La veraj principoj de helplingvo). En la sekvo komenciĝis longa lukto. Unuflanke Zamenhof ne volis reformi sian lingvon, aliflanke Louis de Beaufront (Chevreux) instigis la e-istojn pristudi la proponitajn reformojn. De Beaufront, apogata de Alfred Michaux kaj René Lemaire, kiu plue prilaboris la projekton de Couturat, publikigis en majo 1907 la reformlingvon, kiu ricevis la nomon 'Ido'. Sed la Internacia Asocio de Akademioj, al kiu la Delegacio sin turnis kun sia projekto, deklaris sin nekompetenta decidi la demandon. Post kiam Zamenhof ankoraŭ ŝanceliĝis, en januaro 1908 li anoncis la definitivan rezignon pri la reformoj. Same la plimulto de la membroj de la Lingva Komitato rifuzis trakti la reformojn kun la Delegacio. Do post kiam e-istoj kaj 'idistoj' ne trovis interkonsenton, okazis la neevitebla rompo, famekonata kiel 'I.-skismo'. En majo 1908 de Beaufront identigis sin publike kiel aŭtoron de I. Ĝuste de Beaufront evidentiĝis kiel unu el la plej drastaj kritikantoj de la zamenhofa homaranismo.

Couturat fondis propran revuon kun la titolo *Progreso*, eldonigis lernolibrojn de I. kaj fondigis I.-grupojn. En 1910 jam ekzistis ĉ. 500 idistoj internacie organizitaj; laŭ proksimuma takso ĉ. 5% de la e-istoj fariĝis idistoj (dum verŝajne ĉ. 20% de la Eo-vidantoj transiris al I.). En 1912 funkciis ankoraŭ ĉ. 150 I.-grupoj. Tamen la I.-movado troviĝis malproksime de ĉia harmonio: Couturat regis la I.-akademion laŭ sufiĉe aŭtokrata maniero, la diskutoj pri lingvaj reformoj estis daŭrigitaj kaj la polemiko inter e-istoj kaj idistoj ĝenis la rilatojn. Diversaj planlingvaj personecoj kiel Giuseppe Peano (1858-1932) kaj Otto Jespersen, aŭtoroj de *Latino sine Flexione* (1903) kaj Novial (1928 resp. 1934), malkonsentis kun Couturat kaj finfine iris sian propran vojon, ĉar oni komencis akuzi sin reciproke kaj volis trudi siajn proprajn lingvistikajn vidpunktojn. La Eo-gazetaro ĝenerale prisilentis I-on aŭ ĉirkuligis negativajn opiniojn pri la idistaj „perfiduloj“. Kvankam la I.-movado povis iom teni sin ankaŭ post la unua mondmilito, multaj e-istoj konsideris I-on mortnaskita

afero, kulpigis la idistojn je la skismo de la planlingva movado kaj neniam plu pardonis al ili tiun pekon.

I. do povas esti karakterizita iusence kiel Eo sen homaranismo, sen akuzativo kaj sen supersignoj. Zamenhof, kiu bone memoris la kverelojn lige kun la (fiaskinta) voĉdono de 1894 pri reformoj en la lingvo Eo, havis ĉifoje verŝajne saĝan sintenon: li kontraŭis la idistajn ideojn por eviti la disfalon de Eo, des pli ĉar li observis, ke la idistoj celas forpuŝi lian homaranismon. Kiel granda avantaĝo de la I.-skismo tamen povas esti konsiderata, ke ĝi absorbis la reformemajn spiritojn de la Eo-movado – almenaŭ ĝis 1922, kiam Occidental revigligis la reforman diskuton en planlingvistiko. Alia grava rezulto de la I.-krizo estis ankaŭ la fonda de Universala Esperanto-Asocio (UEA) fare de Hector Hodler kaj ties amikoj en 1908 en Ĝenevo.



Louis Couturat kaj Louis de Beaufront

### **Ido en Svislando:**

*1908 ĝis la unua mondmilito:* En Svislando la I.-movado startis precize la 22an de aprilo 1908 per deklaro de la *zurika Socialista Grupo Esperanta*, kiu aprobis la reformojn en la lingvo Eo, kiuj estis proponitaj de la Delegitaro por alprenado de internacia helplingvo. Duonjaron poste, la 26an de oktobro 1908, sekvis la fonda de la agadokomitato por la propagando de I., kiu estis lanĉita de la eksaj e-istoj → *Anton Waltisbühl* (1855-1940), → *Friedrich Schneeberger* (1875-1926) k.a. Schneeberger, ankoraŭ oficanta prezidanto de SES,

senkulpigis por la tiujara ĝenerala kunveno kaj avertis sian surprizan demision de ĉiuj postenoj en la Eo-movado. En la sama tempo pluraj samideanoj kaj eĉ kompletaj Eo-grupoj, ekzemple tiuj de Aarau/AG (prezidanto E. Fischer), Solothurn, Winterthur/ZH kaj Thalwil/ZH (Eduard Hildebrand, vd. sube), sekvis la rekomendon de la agadokomitato kaj transiris al I. Aliaj same agantaj ĉeloj donis al si la nomon Reform-Esperanto Klubo. Rapide formiĝis novaj I.-organizaĵoj en diversaj urboj, inter 1909 kaj 1910 jenaj: Ĝeneva Komitato por la enkonduko de la Lingvo Internacia sub la gvido de d-ro Maurice Boubier, membro de la Delegitaro; Mondlinguala Societo en Basel kun Justin Gehrig kaj la eksa e-isto Eduard Wenk (1890-1922), kiu estis sekretario kaj prezidanto (1912) de SULI (en 1913 Wenk revenis al Eo). En la reĝna urbo, kie en novembro 1912 okazis internacia kongreso de socialistoj, aperis eĉ laborista I.-grupo, kiu estis prezidita de A. Leepin. Pliaj organizoj naskiĝis en 1910 en *Küsnacht/ZH* (prezidanto: Otto Bresin), *Höngg/ZH* (Rudolf Hiestand, instruisto), *Glarus* (Idana grupo di Glarus) sub la gvido de H. Grünenfelder (kiu estis supera tribunala sekretario), *Arbon/TG* (muzik-instruistino Jeanne Blachmann), *Lüsslingen/SO* (Friedrich Schneeberger), *Biel-Nidau/BE* (komercisto Jean Denzler) kaj *St. Gallen* (*Laborista Grupo* de Anton Blank). Krome estis starigita Informejo di Lingvo Internacia fare de la prezidanto de EG Winterthur, Emil Bühler. La idisto E. Hepe estis la fondanto de la *Socialista grupo di Idisti*. En 1913 formiĝis I.-grupoj inter socialistoj ankaŭ en Schaffhausen kaj Solothurn.

La bernaj idistoj kunvenis kadre de la Kontoro di la lingvo internacia. *Joseph Feierabend* (+1947), oficisto en la ĝenerala direkcio de SFF kaj funkciulo en diversaj stenografiaj societoj de Romandio, kiu troviĝis inter la fondintoj de SES kaj de la berna EG, transiris al I. kaj fariĝis membro de svisaj kaj internaciaj I.-organizoj. Alia frua idisto bern-devena nomiĝis *Emanuel Merz* (1866-1928), notaria oficisto. En 1952 mortis en Berno Walter Karlen, fidela membro de SULI kaj kasrevizoro de ULI.

En Zürich ekzistis eĉ tri I.-organizoj: (Esperanto-)Grupo Progreso de →*Albert Noetzli* (1876-1940), Akademial Mondlingual-Societo de la jurstudento A.-J. Storfer kaj Societo por la linguo internacia (Weltsprache-Verein) de la eks-volapükisto kaj eksa e-isto →*Anton Waltisbühl*; la ĉi-lastaj estis la kunordiganto kaj unua prezidanto de la Agadkomitato por la propagando de Ido en Svislando (1908). Waltisbühl oficis ankaŭ kiel sekretario-kasisto de Unio di l'amiki di la linguo internacia kaj rolis kiel kunfondanto de SULI, estris la kursojn de Akademial Mondlingual-Societo en Zürich kaj partoprenis diversajn I.-kongresojn.

En tiu tempo estis preparata ankaŭ la fundamento de la unua landa organizo: *Suisana Unio por la propagado di la linguo internacia (SULI)*. Ĝia prezidanto fariĝis →*Albert Noetzli*. Ĉi tiu verva planlingvano transiris en 1908 de Eo al la I.-movado kaj verkis la unuan I.-lernolibron aperintan en Svislando. Noetzli, kiu rolis ankaŭ kiel prezidanto de la zurika Weltsprache-Verein/Klubo di mondolingvo (1912), ĝuis la asiston de *Rudolf Hiestand* (1874-1930) kiel sekretario, alia fervora I.-propagandisto en la zurika regiono, kiu oficis kiel prezidanto de la I.-grupo Höngg/ZH (1910) kaj de Suisana I.-Societo en 1914. Kiel pioniro de modernaj lernejoj instrumetodoj Hiestand, instruisto en Zürich-Höngg kaj prezidanto de la zurika instrusinodo, enkondukis I.-kursojn en la superan bazlernejon en Höngg, kontribuadis artikole pri I. en *Schweizerische Lehrerzeitung* kaj adaptis, kun Friedrich Schneeberger, la stenografion laŭ Stolze-Schrey al I.

La ĉefa organo de la internacia movado, *Progreso*, kiu aperis en marto 1908 kaj estis redaktata de Louis Couturat, regule raportis ankaŭ pri la idista agado en Svislando. En ĝiaj kontribuajfoj ne mankis akra polemiko kontraŭ la e-istoj. Oni pedante observis la aktivecon de la e-istoj kaj ĝoje fanfaronis pri iliaj malsukcesoj jen kaj jen. Kie ekzistis I.-grupoj, tie eĉ la lokaj gazetoj raportis pri ilia agado kaj ne hezitis de tempo al tempo denunci la esperantajn rivalojn kiel „fanatikajn kaj naivajn“ (ekzemple en *Neue Zürcher Zeitung*, 1908). En junio 1910 la

revuo *Progreso* memkontente anoncis la morton de la bazela ES kun la komento „tio estas la efiko de la ‘natura evoluo’“. En *Solothurner Zeitung*, kiu eĉ presis I.-kurson, forte sentiĝis la vigleco de pastro Schneeberger.

Ŝatataj propagandaj rimedoj estis kursoj, lernolibroj kaj prelegoj. La I.-lernolibroj de →*Albert Noetzli* kaj →*Arnold Schrag* aperis ĉe Suisa Ido-Kontoro en Oerlikon/ZH kaj ĉe la Ido-Weltsprache-Verlag de Schneeberger en Lüsslingen/SO. Kulminon de la I.-propagando formis la 7an de septembro 1910 la prelego de la eminenta profesoro Wilhelm Ostwald (1853-1932), sekreta konsilisto el Leipzig, en Bernoullianum en Basel. La nobelpremiito (pri kemio, 1909) evidente simpatiis kun I., okupante la oficon de honora prezidanto de Unio di l'amiki di la linguo internacia. Lia germanlingva parolado en Basel, Bern kaj Zürich pri la temo ‘La organizado de la mondo’ altiris la interesatan publikon kaj devis efiki kiel forta apogo al la malamikoj de Eo (→Antologio). Varbita por la internacia lingvo dank’ al tiu prelego estis la supre menciita d-ro →*Arnold Schrag* (+1934).

<b>DIE WELTSPRACHE</b>		
Monatsschrift für die internationale Hilfssprache „IDO“		
<b>Abonnements-Preis:</b> jährlich M. 3,25 halbjährl. M. 1,65 Einzel-Nr. 30 Pf. Man abonniert in allen Buchhandlungen od. direkt beim Verlag	<b>6. Jahrgang der Zeitschrift „Ido“</b> Herausgegeben von der <b>UNIONO POR LA LINGVO INTERNACIONA</b> Verlag: <b>IDO-WELTSPRACHE-VERLAG</b> LÜSSLINGEN (SCHWEIZ)	<b>Kleinoberausgaben</b> aus Deutschland und Österreich an die Geschäftsstelle des deutschen Welt-sprache-Bundes 24 Wallstr. 24 Charlottenburg Alle übrigen direkt an die Schriftleitung.
HEFT 10	Schriftleitung: Fr. Schneeberger, Lüsslingen (Schweiz)	OKT. 1913
<small>INHALT (Kontenaj): Dr. A. Schrag, Der Esperanto-Kongress in Bern. — Dr. Hermann, Dasero konn mediato di marajo. — C. W. J. Reeser e G. C. Roos, Multa dialektoj en Japono. — Übersetzungsprobe. — Vergleich zwischen Esperanto und Ido. — Henry DeWanens, Linguaa question. — Weltsprache-Bewegung. — Zeitschriften-Rundschau. — Offizieller Teil.</small>		

Die Weltsprache de 1913


2. Jaro	Majo 1918	No. 5 (10)
 <b>Suisian Idisto</b>		
<b>Oficial organo dil Suisiana-IDO-Societo.</b> Aparas en la komenco di omna monato. Abonpreco Fr. 2.40 po yaro. Gratuita por la membri dil S. I. S. <b>Redakto ed Editio: Schweiz. IDO-Sekretariat, Zürich.</b> Chekokonto postala dil S. I. S. VIII 4765 Zürich.		

Suisian Idisto de 1913

Laŭ la sugestoj de profesoro Wilhelm Ostwald, kiu prelegis en 1910 ankaŭ en Berno, estis kreita la 27an de februaro 1911 → *Verband für die Schaffung eines Weltspracheamtes*. La celo de ĉi tiu Asocio por la starigo de Universal-lingva Oficejo konsistis en la klopodo prepari la vojon por la enkonduko de universala lingvo tra la kunlaboro kun la diversaj registaroj kaj instituciigi la mondlingvon tra la politiko.

En februaro 1913 Max Niedermann, profesoro pri sanskrito kaj kompara lingvistiko en la bazela universitato, publike prelegis en la samloka Bernoullianum pri la temo de neŭtralaj universalaj lingvoj dum la jarcentoj. Kiel Ostwald ankaŭ Niedermann opiniis, ke I. superas Eon, kaj li bedaŭris la tempoperdon por la afero de la mondlingvo, se oni ne agus konkrete favore al la adopto de tia lingvo.

Plian propagandan armilon la idistoj trovis en la reklamado tra signifaj entreprenoj, ekzemple per la prestiĝo de la fabriko Tobler en Bern, kiu eldonis siajn produktojn ankaŭ en I. Kiam aperis tia I.-prospekto pri la ĉokolado de Tobler, la e-istoj, precipe → Karl Jost (1876-1952) en Zuriko, reagis per kolera protesto kaj minacis la fabrikon per bojkoto de ĝiaj produktoj flanke de la e-istoj. Ankaŭ → Jakob Schmid (1869-1955), tiama SES-prezidanto el Berno, esprimis sian malŝaton, ke Tobler reklamas siajn produktojn per I.



Tobler-reklamo en Ido

En la kvina numero 1913 de *Die Weltsprache* estis anoncita la (re)fondo de Weltsprache-Verein Bern je la 5a de aprilo sub la prezido de iu Hans Christen kaj de → Arnold Schrag

kiel estrarano. Ĉar en ĉi tiu jaro okazis ankaŭ la 9a UK de Eo en Berno, la idistoj evidente iĝis tre nervozaj kaj komencis agi kontraŭ la kongreso kaj la e-istoj. En la naŭa numero de *Die Weltsprache* estis publikigita la bela kongresa festparolado de kolonelo → Emil Frey (1838-1922), eks-membro de la svisa registaro (1890-97), prezidinto de la svisa konfederacio (1894) kaj deĵoranta direktoro de la Oficejo de la Internacia Telegrafa Unio. En sia alparolado Frey varme bonvenigis la ideon de la neŭtrala universala lingvo kaj laŭdis la kongreson. La sekva numero de *Die Weltsprache* raportis pri tiu kongreso kun malica tono, ke ĝi sukcesis arigi ‘nur’ 1200 partoprenantojn; tion la raportinto Schrag misuzis por provi bagateligi la signifon de la Eo-kongreso kaj atribui la propagandan ‘venkon’ al la idistoj. Pro nediskreteco oni povis ankaŭ ekscii, ke la idistoj klopodis saboti la kongreson, sendante leteron al la aŭtoritatoj de ŝtato, kanton kaj urbo kun la alvoko ke oni rezignu sendi oficialan reprezentanton al la UK. La skandalo fariĝis publika, ĉar la letero estis submetita al la prezidanto de la kongreso, Schmid, kiu okupiĝis pri la afero. Fakte ambaŭ flankoj ĵetis oleon en la fajron. En la kongresejo cirkulis bildkarto kun sarkasma karikaturo: dekstre ĝi montris la kongresan prezidanton Schmid en formo de giganta urso, maldekstre estis videbla mort-pendigilo kun vireto, supozeble idisto, surportanta la titolon Weltsprache-Amt kaj sufokata de la giganto (→ Jakob Schmid). La idistoj anoncis, ke ili daŭrigos sian lukton kontraŭ Eo kaj promesis, ke la horo de la vero sekvos, ĉu gajnos diletantoj (t.e. e-istoj) aŭ „seriozaj homoj“ (t.e. idistoj). Sur tiu nivelo do disvolviĝis la rivaleco inter ambaŭ planlingvaj tendaroj. Fakte la e-istoj simple ignoris la agadon de Weltsprache-Amt, kio devis forte ĉagreni la idistojn, kiuj siaflanke riproĉis al la e-istoj fanfaronan kaj neseriozan konduton, imputante al ili, ke per sia kongreso ili ne intencas propagandi la ideon de mondlingvo en si mem, sed celas mortigi la idistojn (Schneeberger raportis). Kolonelo Frey certe devis senti sin en dilemo, ĉar li havis samtempe la funkciojn de honora prezidanto de *Verband für die Schaffung eines Weltsprache-Amtes* kaj de la alta

protektanto de la berna UK – tiel li estis malagrabla tuŝita de la rivaleco inter e-istoj kaj idistoj.

Kun Ferdinand Vetter, profesoro pri germanistiko (kiu kritikis la prefikson ‘mal’ en Eo), kun d-ro A. Gobat, ano de la berna registaro kaj direktoro de la Internacia Pacoficejo, kun profesoro Ad. Thürlings de la berna universitato kaj kun d-ro med. E. Jordi la idistoj trovis iujn simpatiantojn. Post kiam Schrag engaĝiĝis diversmaniere por la I.-movado, li transiris al Occidental en 1928.

Malgraŭ kelkaj idistaj sukcesoj kaj progresoj, ne ĉio iris glate. La aŭtomobila akcidento, en kiu pereis Louis Couturat en 1914, kaj la eksplodo de la unua mondmilito en la sama jaro rezultigis vakuon en la I.-movado. Pluraj gravaj I.-aktivuloj malaperis, la svisaj membroj devis militservi. En tiama svisa I.-gazeto estis raportite, ke la prezidanto de la I.-grupo en Olten/SO forpasis dum sia militservo en Ruslando kaj ke la kasisto vundiĝis en Francio. La pacinsulo Svislando tamen permesis al la mondlingvanoj daŭrigi la verkon de Couturat, Leau kaj de Beaufront.

Meze en tiu malfacila tempo la nelacigebla zurikano Albert Noetzli fondis, fine de 1916, la periodaĵon *Suisian Idisto*, kiu fariĝis la oficiala organo de *Suisian Ido-Societo (SIS)*, kiu estis prezidata de *Herbert Schumacher*, instruisto en Niederglatt/ZH. Post la malapero de *Suisian Idisto* en 1922 Noetzli anstataŭigis ĝin per la pli internacia bulteno *Ido* (kiu aperis ĝis 1929).

*Post la unua mondmilito:* Post granda kunveno de la orientisvisaj idistoj en Rapperswil/SG, la 8a ĝenerala asembleo de Suisian I.-Societo okazis en marto 1917 en Baden/AG. Ĝin partoprenis 51 samideanoj el 14 diversaj lokoj de Svislando. La landa asocio nombris entute 163 membrojn. Centoj da homoj komencis lerni I.on. Sed ne ĉiuj lokaj grupoj kreskis tiom rapide kiel dezirate, kaj post la unuaj seniluziigoj la membraro ĉesis kunveni regule, ekzemple en la kazo de la grupo Progreso en Zürich. Tamen aliloke floris freŝaj aktivecoj: Novaj grupetoj aŭ formiĝis en Rüttenen/SO (1919, prezidanto: Leo Walker), Olten/SO (Fr. Wettler), Reinach/AG, Bern (Arnold Schrag kaj H. Lenhard), Schaffhausen (Karl Rauch),

Altstetten/SG, Rapperswil/SG, Degersheim/SG, Wil/SG (Elise Hisely), Arbon/TG (1919, Max A. Pitasch), Steckborn/TG (C. Pischl-Hartmann, apotekisto), Horn/TG (→Ernst Anderegg). En St. Gallen ekzistis en 1921 eĉ tri I.-organizoj: Progreso, Katolika Ido-Societo kaj Emancipanta Stelo. Por kunordigi kaj efikigi sian laboron ili baldaŭ kunfandiĝis en Ido-Federuro St. Gallen sub la prezido de Ernst Klee-Tobler (1883-1965). La fondo de la interkantona I.-grupo Bodan komence de 1921, kiu kunigis la samideanojn de Rorschach/SG kaj Arbon/TG sub la gvido de →*Ernst Anderegg* (1901-89), signifis plian mejloŝtonon en la orientisvisa I.-movado. Samjare efektiviĝis la propagando inter poŝtoficejoj, inter kiuj kelkaj ekstudis I.on kaj fariĝis membroj de SIS.

Okaze de publika prelego de Noetzli en aprilo 1921 ĉeestis ankaŭ kelkaj e-istoj (Müller, Unger, Schacht), kiuj klopodis kontraŭ-argumenti la teoriojn de I. Ke la etoso devis esti sufiĉe streĉita, tion ilustris poste la raporto en *Suisian Idisto*, kiu kulpigis la e-istojn esti volontaj perturbi la kunvenon.

En oktobro 1921 stariĝis la Ido-klubo de *Luzern* fare de s-roj Friedrich, Hofstetter, Hufenus kaj Nagler. La anoncitan lingvokurson sekvis 18 personoj, kiuj regule vizitis la 12 lecionojn. La invito al la sekvanta kurso en 1922 ne trovis eĥon, sed dum vintro 1923/4 ree ĉeestis sufiĉe granda nombro, nome 15 lernantoj. De aŭtuno 1924 ĝis printempo 1925 I. estis instruata denove al 18 homoj. Granda surprizo estis en oktobro 1925, kiam en Lucerno 32 personoj aliĝis al la I.-kurso. Poste la intereso rapide malkreskis. Kulpon por tiu negativa evoluo oni vidis en la populariĝanta lernado de naciaj lingvoj, precipe de la angla, fare de vastaj popolamasoj. La monatajn kunvenojn de la lucerna I.-grupo partoprenis ne pli ol 7-8 personoj. En la postaj jaroj la lucerna I.-movado estis gvidata de Emmy Voigt. Inter la membroj de la lucerna I.-grupo estas trovebla ankaŭ Johann Alfred Büchel (1886-1955), kiu laboris kiel estro de poŝtoŝtelo, lernis I.on en la 20aj jaroj kaj uzadis ĝin ĝis la fino de la dua mondmilito.

Hofstetter, al kiu ni dankas tiujn interesajn informojn donitajn en septembro 1977 kaj

publikigitajn en *Suisa Ido-Buletino* en julio 1980, rakontis jenan memorindan detalon: La analizo de la listo de kurs-partoprenintoj evidentigis, ke granda nombro de la kursanoj estis membroj de komunistaj partioj. La intereson en tiuj medioj pri la internacia lingvo kredeble kaŭzis la subteno ne nur de Eo, sed evidente ankaŭ de I. en bolŝevika Ruslando, kie la planlingvo estis favorata kiel internacia komunikilo ĉe proletoj. Fakte multaj junaj socialistoj, ekzemple en Altstätten/SG kaj Emmenbrücke/LU, komencis studi la lingvon I. Cetere estas ankaŭ interese rimarkigi, ke krom la socialistoj ankaŭ katolikaj e-istoj transiris al I.

En centra Svislando I. estis propagata de la kemiisto *Mario Schmid* (1899-1973), kiu en la 20aj jaroj malfermis I.-informejon en Brunnen/SZ, kunlaboris kun la gazeto *Suisian Idisto* kaj partoprenis la unuan internacian I.-kongreson en Vieno (1921). Li estis prezidanto de Suisian I.-Societo, Suisa I.-Radio-Klubo (fond. 1924 en Zürich), de Suisa Mondlingual Societo (fond. 1924) kaj de Suisa I.-Federuro (fond. 1926). Noetzi oficis kiel administranto de la du laste menciitaj organizaĵoj. Unu el la komitatoj nomiĝis *Nicole Wittwer* (1892-1968), poŝt oficistino en Zürich kaj kasistino de SULI en la 60aj jaroj.

En 1924 mortis alia fervora I.-propagandisto el Zürich, nome la litografo *Fr(iedrich) Vonow* (\*1846).

Kiam la e-isto →*Engelhard Pargätzi* (1885-1943) transiris al I., li redaktis la periodaĵon *Universala Framasono* (ĉ. 1921).

Komence la I.-movado do disvastiĝis ĉefe en la germanlingva parto de Svislando. Iom post iom oni legis ankaŭ pri la aktivecoj kaj grupoj en Romandio kaj Tiĉino: en 1914 aperis I.-grupo en *Yverdon/VD* sub la gvido de *Hans Aliesch*. La gvidanto de la loka I.-grupo en *Genevo* nomiĝis *Paul Meylan* (1898-1988), kuracisto, kiu poste partoprenis la monatajn kunvenojn de la zurika I.-grupo.



Paul Meylan

En Friburgo aktivis iu *A. Probst*, en *Bulle/FR* laboris por I. iu *A. Debieux*, kaj en la lemana regiono (*Lausanne, Rolle/VD*) elstaris →*Ric Berger* (1894-1984) antaŭ ol transiri al *Occidental* kaj poste al →*Interlingua*. En junio 1917 fondiĝis *Valeza Ido-Societo* en *Sion/VS* fare de la katolika ekleziulo →*Jules Gross* (1868-1937).

En Tiĉino I. ricevis moralan subtenon kaj verŝajne ankaŭ financon apogon fare de interesa triopo: *Franco Chazai*, *Agostino Bonzanigo* kaj *Pietro Rezzonico*.

→*Franco Chazai* (1910-73), instruisto de la franca lingvo en duagrada lernejo de *Balerna/TI*, estis poeto, pacaktivulo kaj politikisto.

*Agostino Bonzanigo* (1845-1936) riĉiĝis pro la komerco per ŝtalo, fero kaj relmaterialoj okaze de la konstruado de la traalpa fervojo (*Gothardo*). Kiel konservativa patrioto li okupiĝis pri politiko kaj fariĝis ano de la tiĉina registaro. La tiĉina ribelo en 1890, lanĉita de la radikala partio, faligis lin kiel politikiston. Komence *Bonzanigo* interesiĝis pri Eo, sed poste preferis I.on, kie li elstaris kiel oratoro kaj aŭtoro de itallingvaj I.-propagandiloj.

Kvankam *Pietro Rezzonico* (1867-1921) neniam trovis la okazon finligni la lingvon I., li ĉiam kaj ĉie propagandis ĝin kaj kiel riĉa komercisto verŝajne ankaŭ finance subtenis la I.-movadon.


La I.-grupo de *Locarno/TI* nombris 49 membrojn kaj tiu en *Lugano/TI* 28 anojn. Dise tra ceteraj lokoj de Tiĉino vivis pliaj 30 individuaj simpatiantoj. Pro manko de itallingvaj lernolibroj oni uzis instruilaron en la germana kaj franca lingvoj. Sed la italaj



idistoj baldaŭ solvis tiun problemon, kreante proprajn materialojn.

La evoluon de la I.-movado en Svislando dum la 1920-30aj jaroj esence firmigis krom la supre menciitaj aktivuloj grupo de planlingvaj adeptoj, kiuj estis tre engaĝigemaj, sed iom individuismaj, kaj ilia maniero trovi la taŭgan vojon al la ideala planlingvo estis iom heterogena.

Apud Albert Noetzli, kiu estis jam prezentita supre, la dua frua I.-adepto nomiĝis → *Adolphe Creux* (1876-1933). Ĉi-tiu iama e-isto, filologo kaj katolika pastro en Sorens/FR kaj Rue/FR prezidis komence de la 20aj jaroj la svisan sektion de Unio de Katolika Idista. Creux oficis kiel I.-agenteo en Sorens, kunaŭtoris I.-lernolibron kaj kiel stenografo adaptis la stenografian sistemon Duployé unue al Eo, poste al I. Kiam liaj reform-sugestoj en la naturalisma direkto estis rifuzitaj de Louis Couturat, Creux aliĝis en 1922 kiel unua sviso al la lingvo → Occidental kaj en 1928 kuniniciatis la transformon de Romanda Ido-Societo (fond. 1925) al SAPO, kies unua vicprezidanto li fariĝis.



Matejka kiel idisto kaj Eduard Hiltbrand en la revuo *Progreso*

En 1918 aliĝis al I. → *Alphonse Matejka* (1902-99) en St. Gallen. En la I.-movado Matejka rolis i.a. kiel sekretario de Unio de Katolika Idista por la Linguo Internacia ULI (1929-34), prezidanto de Suisa Ido-Societo (1934-35) kaj redaktoro de *Progreso* (1931-34). (→ Occidental-Interlingue)

En tiu periodo alvenis al I. ankaŭ la lerneja instruisto → *Frédéric (Fred) Lagnel* (1901-95)

en Cheseaux-sur-Lausanne/VD. En sia I.-periodo Lagnel estris la laŭzanan I.-sekretariejon (1922), oficis kiel sekretario de Internacia Ido Radio-Klubo, de Suisa Ido-Radio-Klubo (fond. 1924 en Zürich) kaj de Romanda Ido-Societo kaj kunlaboris kun la redakcio de la periodaĵo *Ido*. (→ Occidental-Interlingue)


Plue menciindas ankaŭ la triopo Josef Aschwanden, Jean Denzler kaj Heinrich Nidecker.

→ *Josef Aschwanden* (1877-1957) en Biel-Bienne/BE (1918-31) malŝatis Eon pro la finaĵoj en ĝia morfologio. En I., kiun li ekkonis per la germanlingva verko *Weltsprache und Wissenschaft* de Louis Couturat, Otto Jespersen, Wilhelm Ostwald k.a. (Jena 1912), li konstatis lingvan progreson. (→ Occidental-Interlingue)

→ *Jean Denzler* (1871-1943) estis e-isto, kiu frue transiris al I., fondante la Ido-grupon en *Nidau/BE* (1910) kaj instruante la lingvon. (→ Occidental Interlingue)

→ *Heinrich Nidecker* (1894-1982) estis la prezidanto de la bazela I.-grupo kaj de Suisa I.-Federuro. (→ Occidental-Interlingue)

Ĉefe pro fortaj duboj pri la perfekteco de I. kaj ankaŭ pro la trudema konduto de la I.-akademio, la grupo de tiuj tri ĉi tie prezentitaj aktivuloj distanciĝis de la lingvo de Couturat kaj ekde 1928 transiris al la Occidental-movado de Edgar von Wahl, same kiel Lagnel, Berger, Creux kaj poste ankaŭ Matejka.



Komuna broŝuro de Schrag, Aschwanden kaj Nidecker

Ĝis ĉirkaŭ la jaro 1937 en Winterthur I. estis propagandata, precipe tra la nacilingva gazetaro, de *Fritz Haas* (1898-1971), kiu kiel pluraj aliaj poste aliĝis al la Occidental-movado. (→Occidental-Interlingue)

Kun la franco →*Marcel Pesch* (1893-1970) elpaŝis en la I.-movado alia originala idisto, kiu aktivis por I. ĉefe verke-redaktore, eldonante dum la 20aj jaroj en Ĝenevo plurajn I.-printaĵojn (*Idista Edukero*, 1921-22; *Defirs*, magazina revuo, 1922; *La Jurnalito Internaciona en Ido*, 1929-30). Pesch kunlaboris kun la redaktoro de *Suisian Idisto*, estis kooptita I.-akademiano kaj inventis propran kursivan I.-stenografion. Lia plej grava verko, la 632-paĝa *Diccionario de la 10'000 radiki di la linguo universalala Ido*, aperis en 1964.

*Post la transiro al Occidental*: La 21an de aprilo 1928, la membroj de *Romanda Ido-Societo (RIS)* do kunvenis en Lausanne por studi la aktualan situacion de la lingvo internacia kaj por determini la ontan laboron de la societo. Ric Berger kaj Fred Lagnel prezentis raportojn pri Eo, I. kaj Occidental. La filologo Adolphe Creux kompare analizis la du lingvojn I. kaj Occidental kaj, konstatante la evidentan superecon de Occidental kompare kun I., li konkludis, ke Occidental estas pli natura, pli internacia, pli facila, pli regula, pli komprenebla kaj pro tio finfine pli taŭga ol I. kaj sugestis al la ĉeestintaj mondlingvanoj transiri al Occidental. Post trihora diskutado estis fondita *Sviss Association por Occidental (SAPO)*, kun Ric Berger kiel prezidanto. La zurikano Noetzli, kasisto de la I.-akademio kaj redaktoro de ĝia *Oficiala Informilo*, restis fidela al I. Kiel reprezentanto de la konservema branĉo li kondamnis ĉiujn neloyalajn idistajn samideanojn, kiuj esprimis diverĝan opinion, kaj kreis la novan organizon Uniono Idista.

La grava planlingva evento en Romandio ne restis sen sekvoj. Fone de la prezentita movada konstelacio, la internaj konfliktoj, kiuj ŝvelis jam de pluraj jaroj, antaŭ ĉio kun la reformemaj samideanoj, estis antaŭprogramitaj por eksplodi. La transiro ĉefe de la romandaj idistoj al Occidental en 1928 kulminigis la organizan dividiĝon ene de la I.-movado, kiu kronis la laboron de la

7a internacia I.-kongreso en aŭgusto 1928 en Zürich. En →*Cosmoglotta* (n-ro 53/1928), la ĉeforgano de Occidental, Ric Berger donis impreson pri la etoso dum tiu kongreso. Senluziigitaj, ke de 1922 Occidental jam absorbis kelkajn gravajn idistojn, Noetzli kaj la prezidanto de la kongreso, la germano Peus, konsideris la reformemon de kelkaj idistoj kiel esencan danĝeron por I. Sekve oni ignoris ilin publike kaj defendis sian propran konservativan pozicion kun la celo eviti, ke la reformemuloj akiru la gvidan rolon dum la kongreso. Sed la kongreso fermiĝis sen solvi la problemojn. La konservemuloj restis rigidaj kaj la progresema samideanoj definitive forlasis I. on favore al Occidental. La prezo pagenda por la interna malakordo do estis alta kaj la bato por la internacia I.-movado eĉ pli forta, kiam ankaŭ tiom elstaraj idistoj kiel la svedo Per Ahlberg, la franco Louis de Guesnet, la dano Otto Jespersen, la ruso Nikolaj Juŝmanov kaj aliaj same rezignis pri I. kaj transiris al Occidental aŭ serĉis sian propran vojon en planlingvistiko. Noetzli, la redaktoro de la nove lanĉita periodaĵo *Ido* (kiel daŭriganto de *Suisian Idisto*) kaj sekretario de Suisa Ido-Federuro (fondita en 1926), kreis la kontraŭ-organizon Uniono Idista por superatuti la asocion Uniono por la Lingvo Internaciona (ULI) kaj por kondamni ĉiujn malfidelulojn de de Beaufront.

Sed baldaŭ montriĝis, ke la periodaĵo de Noetzli *Ido* ne sukcesis avanci kiel ĉeforgano de la movado kiel ĝi celis. Ĝi malaperis jam en 1929. En la revuo *Helvetia* (n-ro 7/1929) Berger raportis pri la 'duelo' inter ambaŭ organizoj, ĉiam kulpigante Noetzli, kies kruda konduto distancigis de li grandparton de la idistoj. Por fini la ĉapitron Noetzli kaj por provi novan komencon, samjare la kontraŭuloj de Noetzli kaj de la konservema I.-akademio fondis novan asocion: *Suis Uniono por la Lingvo Internaciona (SULI)*. Ĉi tiu organizo, kiu aliĝis al ULI (direktata de la parizaj idistoj) portis la saman mallongigon kiel tiu fondita de Noetzli en la unua periodo de I., sed havis iom alian plentitolon. La unua prezidanto de la nova SULI, →*Hans Cornioley* (1896-1977) estis aktiva idisto jam ekde 1914/15, svislande kaj internacie. Alia aktiva I.-propagandisto

nomiĝis Rudolf Portmann (1902-31), kiu unue vivis en Basel, poste translokiĝis al Davos/GR.

Post 1914, la jaro de la tragika morto de Couturat, la internacia I.-movado dume restis sen vera internacia organo, se oni preteratentas la periodaĵon *Suisian Idisto* kaj poste *Ido* de Noetzli, kiuj disradiis ankaŭ internacie. Matejka, intertempe translokiĝinta al Parizo, oficis kiel sekretario de ULI kaj redaktis la organon *Ofical Buletino del ULI*. Konsiderante lin sperta kaj serioza I.-aktivulo, oni konfidis al li la taskon de la ĉefredaktoro de *Progreso*, la ĉefa I.-revuo, kiu renaskiĝis en 1931. Ĉi tiun oficon Matejka plenumis ĝis 1934, la jaro, en kiu li transprenis novajn funkciojn en la svisa I.-movado, interalie la prezidantecon de SULI, post la demisio de Cornioley.

La agado de la en 1926 forpasinta I.-korifeo Friedrich Schneeberger estis daŭrigata de lia filino Clara (\*1907) kaj de ŝia edzo → *Jakob Kreis-Schneeberger* (1907-68). Ĉi tiu elstara svisa idisto (de 1925) kunfondis la zurikan I.-klubon Progreso kaj la agentejon Weltsprache-Agentur Zürich (1927), enkondukante la 'svisan periodon' de la I.-movado (ekde 1939). En 1945 Kreis estis elektita kiel prezidanto de SULI. Post lia frua morto en 1968, kiu kvazaŭ finis la 'svisan periodon' de la I.-movado, lia vidvino Clara daŭrigis la laboron por la I.-movado ĝis ĉ. 1994, kiam pro alta aĝo ŝi rezignis.

La 15a internacia I.-kongreso ankoraŭ povis okazi en aŭgusto 1939 en St. Gallen. Unu el ĝiaj kunorganizantoj estis → *Franz Zimmermann* (1899-1951). Sed la eksplodo de la dua mondmilito en septembro interrompis la idistan agadon. Pluraj svisaj aktivuloj ree devis deĵori en la armeo. Tamen tio ne malhelpis la elekton de nova estraro de SULI en 1940: nova prezidanto (ĝis 1943) fariĝis la zurika instruisto kaj eksa e-isto *Eduard Hildebrand* (1866-1945), instruisto, iama e-isto, kiu multajn jarojn prezidis la I.-grupon Thalwil kaj kiu, translokiĝante en 1931 al Zuriko, ekmembris en la zurika I.-grupo. En 1937 li partoprenis la internacian I.-kongreson en Parizo.

La nova konkurenco flanke de Occidental ŝajne ne tro minacis unuavice la aferon de la e-istoj, sed evidente kontribuis al la

marĝenigo de la I.-movado. Pro tiu timo la idistoj ekserĉis la kontakton kun la Eo-movado. En kunveno de svisaj e-istoj en novembro 1941 en Berno, pri kiu raportis *Svisa Espero* 6/1941, estis traktita la propono de Jakob Kreis rilate iun kunlaboron inter e-istoj kaj idistoj. Kvankam la diskuto evidente estis utila por ambaŭ flankoj, la kunvenantoj „post funda kaj senpasia ekzameno de la propono“ konvinkiĝis, ke la kunlaboro kun la idistoj „nek eblas, nek indas, nek estas sendanĝera por la mondlingva problemo“ kaj unuanime rekomendis malakcepti la „kreon de komuna fronto“ kun la idistoj „eĉ por praktikaj celoj“. En la antaŭa *SE* 5/1941 aperis akra pravigo kontraŭ tia „komuna fronto“, kiu ekskludis ĉian kunlaboron kun la I.-movado. La idistoj, kiuj „komencis sian karieron per perfido kaj trompo“, estis kulpigitaj pro la skismo, kiu esence malhelpis la progreson de la afero de la neŭtrala universala lingvo. La senlima ĉagreno, kiu markis plurajn generaciojn de e-istoj, esprimiĝis per kvazaŭa kondamno de la idistaj renegatoj: „La idistoj ja bezonus nian helpon; ilia movado jam fiaskis, ĝi ankoraŭ nur vivetas per la stulta kaj malhonesta maniero malfaciligi la antaŭan marŝon de Eo. Se la kelkaj idistoj ankoraŭ agantaj volas helpi por ke mondlingvo definitive venku, ili re-aliiĝu al la Eo nereformita. Ĉiukaze, nin membrojn de vivanta movado, radikiĝinta en cent popoloj, ne tre interesas la disputoj inter partianoj de mondlingvaj projektoj. Hodiaŭ kiel post la 'Delegacia afero', ni daŭrigas fosi nian sulkon.“ Tio estis klara kaj senkompromisa respondo flanke de la e-istoj al la pli kaj pli senhelpaj idistoj. Legante tiujn liniojn, oni emus kompari la situacion en la planlingva movado kun tiu en la kristana eklezio, kie ortodoksoj, katolikoj kaj protestantoj kverelas pri la ĝusta vojo en religio.

*Post la dua mondmilito:* Malgraŭ la ŝoko de la transiro de pluraj gravaj idistoj de la unua generacio al Occidental, malgraŭ la forpaso de Schneeberger kaj malgraŭ la forta konkurenco de Eo kaj de aliaj planlingvoj kiel Occidental aŭ Basic English, kiu tiam iom furoris, la I.-movado persiste defendis sin kontraŭ tiuj defioj.

Post la milito SULI do estis gvidata de Jakob Kreis kiel prezidanto, asistata de →Ernst Anderegg (vicprezidanto), Otto Kostezer (sekretario) kaj Heinrich Dürst (kasisto).

La impost-oficisto kaj revizoro *Otto Kostezer* (1896-1957) en St. Gallen agadis kiel I.-instruisto kaj propagandisto ĉefe inter katolikoj. Kiel fondinto de Katolika Ido-Societo en St. Gallen (1921) li estis ankaŭ la gvidanto de Suisa Ido-Kontoro (1937). Krome Kostezer disponiĝis kiel kasisto de ULI kaj ekspedis ĝian revuon *Progreso*.

Alia idisto en St. Gallen nomiĝis Johann Georg Züllig (1868-1942), kiu entuziasmiĝis pri la temoj Europa-Unio kaj lingvo internacia kaj kiu okaze de sia morto estis prezentita en *Progreso*. En 1951 mortis Gotthilf Haug, Zürich, diakono kaj I.-simpatianto, kiu aperigis artikolojn en I. en la periodaĵo *Diakoniebote*.

*Heinrich Dürst* (1911-2003), loĝinta en Rüşchlikon/ZH, estis siatempe prezidanto de la zurika I.-grupo kaj eldonanto de la cirkulero *Idisti inter su* - Oficiala organo dil Suisa Ido Propago Komitato SIPKO (1931). En sia korespondo (1995) kun A. Künzli li konfesis, ke siatempe ankaŭ li pritaksis I-on kiel plej bonan solvon de artefarita lingvo. Bedaŭrinde la I.-movado tiam estis sen gvidado. Eon li abomenis kiel „plej malbonan ekzemplon de devojiĝo de rusa enfiltriĝo“. Kiam li konstatis, ke ankaŭ la I.-movado glitis en la maldekstreman tendencon, li distanciĝis de la afero.

*Otto Fehlmann* (1883-1981), lokomotivestro, idisto de antaŭ la unua mondmilito, aktivulo de la I.-grupo Olten, fondinto de I.-societo por abstinuloj, prezidinto de Suisa Ido-Federuro (1928), plenumis la taskon de la vicprezidanto de SULI en la 50-aj kaj 60aj jaroj. Lia sekretario nomiĝis Arthur Novell (1891-1967), kaj la kasistan oficon plenumis →Hans Cornioley. En 1986 forpasis d-ro Max Schäppi (\*1912), aktiva idisto, diplomita I.-instruisto kaj membro de la zurika I.-grupo.

La montevidea rezolucio de Unesko favore al Eo en 1954 neatendite kaj tre malagrabla trafis la idistojn (nature ankaŭ la occidentalistojn). Tiu surpriza kaj grava agnosko de la lingvo de la ‘malamikoj’ fare de grava monda organizo, por kiu senlace luktis la tiama prezidanto de UEA Ivo

Lapenna (1909-87), ĵaluze tuŝis la anojn de ĉiuj konkurencaj planlingvaj movadoj. Kiel reago al tiu evento, la idistoj perdis multe da energio por kontraŭ-argumenti Eon kaj la aliajn planlingvojn. Apenaŭ digestinte la rezolucian ŝokon, la revuo *Progreso* komencis nutri siajn paĝojn per diversaj diskutigaj artikoloj. La polemikon kontraŭ Eo akompanis la bagateligo de la signifo de la rezolucio de Unesko, kutima mekanismo ĉe la kontraŭantoj de Eo. La rezulto ĉe Unesko estis interpretata ne nur kiel bato kontraŭ la I.-movado mem, sed kontraŭ la tuta planlingva ideo. (Analoge sinteno regis en la kongresa jaro 1913!). Probable ne venkos la plej perfekta planlingvo, oni prognozis, malice aludante Eon, sed tiu kun la plej efika propagando. Sed ne mankis ankaŭ memkritiko. La ofendita komentanto en *Progreso* alvokis la idistojn ĉesigi sian indiferentan sintenon kaj apliki pli celtrafajn varbmetodojn por diskonigi la propran lingvon. Revante pri la sama iam atingenda sukceso, kiun ĵus spertis la e-istoj, la evidente iom revema aŭtoro finis la artikolon per jena frazo: „Kiam nia movado estos granda kaj potenca, tiam ni povos gajni la sciencistojn kaj registarojn, kiuj volonte aprobas kaj entuziasme subtenos nian lingvon.“

Grava motoro de la svisa I.-movado evidentiĝis en la persono de la zurika bankoficistino →*Emma Louise Bosshard* (1894-1991), kiu revigligis la vivon de la I.-komunumo, regule partoprenante ankaŭ la internaciajn I.-kongresojn. Iom post iom ŝi transprenis la gvidon de la tutlanda movado, kiel prezidantino de SULI, kaj funkciis ankaŭ kiel eldonantino de *Suisa Ido-Buletino*. Kiel sekretario de SULI ŝin helpis *Robert Stucki* (1904-71), kiu estis svisa I.-konsulo, sekretario kaj kasisto de SULI, prezidanto de la I.-societo Oerlikon/ZH (fond. 1928) kaj ankaŭ prizorginto de la svisa I.-kontoro en Wallisellen/ZH. Krome li estis kunredaktoro de *Suisa Oficiala Ido-Buletino*, oficis kiel kasisto de ULI kaj ekspedis ĝian revuon *Progreso*. Post 27-jara interrompo en 1962 Stucki ree aliĝis al la I.-movado; en 1971 li iĝis viktimo de trafikakcidento.



Emma Louise Bosshard kun idistoj en Zürich

La rompo inter ambaŭ movadoj, e-ista kaj idista, do estis definitiva kaj firme nerevokebla, la ‘venĝo’ - kaj triumfo - de la e-istoj ne evitebla. La frosta periodo inter idistoj kaj e-istoj estus daŭranta verŝajne eterne, se ne estus aperinta nova – kaj sufiĉe unika - planlingva adepto, kiu kapablis racie ponti inter la rivaloj: → *Tazio Carlevaro* (\*1945): ĉi tiu tiĉina junulo, poste konata kuracisto en sia kanton, en 1957 lernis unue ne Eon, sed I.on – tamen baldaŭ li eklernis ankaŭ Eon kaj ekpraktikis eĉ aliajn planlingvojn (kiel → *Occidental-Interlingue*, → *Interlingua* k.a.). Kvankam ne ĉiuj e-istoj ŝate observis, ke tiom talenta kaj kapabla homo disponigas siajn fortojn kaj monon ankaŭ al aliaj planlingvoj, ŝajnas ke hodiaŭ Carlevaro kiel ĝenerale praktikanta interlingvisto estas ĉie akceptata kaj respektata. Evidente neniu plu emociiĝis aŭ vidis iun danĝeron flanke de I., kiam *SER* 11/1976 anoncis liajn *Eseojn pri Ido*, aŭ kiam en 1977 lia mikro-eldonejo ‘Hans Dubois’ aperigis la libron *Esperantal Antologio en Idolinguo. Unu introdukto*. La 193-paĝa *Bibliografio di Ido*, kompilita de Carlevaro en kunlaboro kun Reinhard Haupenthal kaj eldonita en 1999, ja estas konsiderinda kontribuo al interlingvistiko.

Lia konkluda studo titolita per *Ĉu Eo postvivos la jaron 2045?* (*Bellinzona* 1/1999, 2/2000), per kiu Carlevaro celis klarigi la kaŭzojn de la iom- post-ioma ŝrumpo de Eo en okcidenta Eŭropo kaj de la signifo de la disvastiĝo de la angla lingvo internacie kaj en

Svislando, ja certe ne povis plaĉi al ĉiuj ĝisostaj e-istoj, kiuj eble demandis sin, ĉu do eble tamen temas pri ‘konspiraĵo’ kontraŭ Eo de en sia koro konvikita, kaŝita idisto?



Tazio Carlevaro

*I.-kongresoj en Svislando:* De 1921, la jaro de la unua internacia I.-kongreso en Vieno, ĉiujare la sama manifestacio okazis en alia lando, kiel ĉe la e-istoj. Tamen, kompare kun la Universalaj Kongresoj de Eo, la partoprennombro kaj programo de la I.-kongresoj estis multege pli modestaj. Antaŭmilite Svislando gastigis du internaciajn I.-kongresojn: en Zürich (1928) kaj en St. Gallen (1939). Post 1950, la jaro de la unua postmilita kongreso en Colmar (Francio), la svisaj idistoj organizis internaciajn kongresojn („konfero“) kaj renkontiĝojn („renkontro“) denove en Zürich (1961 kaj 1969), krome dufoje en Thun/BE (1962 kaj 1975) kaj lastfoje en La Chaux-de-Fonds/NE (1972). Du svisoj elstaris en la organizado de tiuj kunvenoj: Emma Louise Bosshard, la motoro de SULI, kaj Tazio Carlevaro, vicprezidanto de SULI kaj redaktoro de la informilo *Suisa Ido-Buletino*. Post la kreo de CDELI kaj de ĝia konsulta komitato sub la prezido de Carlevaro, la idistoj kunvenis plurfoje en La Chaux-de-Fonds. Ankoraŭ en 1981 Internacia Feria Altlernejo de KCE kaj ties restadejo GEP bonvenigis la idistojn al stud-seminario pri la I.-kulturo kaj -literaturo. Kvankam en tiu e-ista ‘pilgrimejo’ la idistoj devis senti sin kiel la mormonoj en Vatikano, kiel ironie sed trafe esprimis unu el la ĉeestantoj, ili tamen disradiis optimismon kaj konsideris la kunvenon nekutima kaj kuraĝiga evento en la historio de la I.-movado, kiu en Svislando

praktike elĉerpiĝis, sed tamen iom ekzistas internacie.

Sekvas la detalaj biografioj de kelkaj elstaraj reprezentantoj de la svisa I.-movado.

Interreto:

<http://www.idolinguo.com>

### **Ernst ANDEREGG**

1901-1989



Komercisto kaj kontoristo ĉe la firmao Raduner + Co. en Horn/TG, estis eksa e-isto, kiu transiris al I. dum la unua mondmilito, kie li fariĝis svisa I.-agento kaj -konsulo, prezidanto de la I.-grupo Bodan en Rorschach/SG kaj Arbon/TG, I.-instruisto, revizoro (30aj jaroj), vicprezidanto (1945) kaj asesoro (1965) de SULI. Dank' al lia kontribuo la nacilingva enciklopedio *Svisa Leksikono* (1951) menciis la neŭtralan universalan lingvon ĝenerale kaj I.on aparte, kaj estis ankaŭ li, kiu aperigis artikolojn pri planlingvaj temoj i.a. en *Bodensee-Hefte* (Konstanz 1979). Suferante lam-malsanon (poliomeliton) ekde la infanaĝo, en la lastaj vivojaroj li retiriĝis de la aktiva movado. En *Cosmoglotta-Informationes* (2/1935) li estis karakterizita kiel „agrabla tolerema”.

### **Emma Louise BOSSHARD**

1894-1991



Laŭ profesio B. estis bankoficistino en Zürich. Plurajn jarojn ŝi vivis kaj aktivis en okcidenta Afriko (Ganao).

B. lernis Idon antaŭ la dua mondmilito ĉe Eduard Hildebrand kaj →Albert Noetzli. Ŝi ofte korespondis kun eksterlandanoj, precipe kun samideanoj en Orienta Eŭropo, al kiuj ŝi sendis varojn tie mankantajn kaj urĝe bezonatajn. En Zürich ŝi revigligis la vivon de la Ido-komunumo, helpis eldoni broŝurojn kaj librojn (ekzemple la radikvortaron de →Marcel Pesch) kaj regule partoprenis la internaciajn Ido-kongresojn; en 1969 ŝi mem organizis la eŭropan Ido-kongreson en Zürich. Ekde ĉ. 1937 la diplomita Ido-instruistino estis la prezidantino de SULI, kies honora prezidantino ŝi fariĝis en 1982, kaj eldonis *Suisa Ido-Buletino*.

### **Tazio CARLEVARO**

→parto 7: INTERLINGVISTIKO

### **Franco CHAZAI**

1910-1973

C. estis instruisto de la franca lingvo en duagrada lernejo de Balerna/TI. Kiel poeto kaj pacaktivulo, fondinto kaj direktoro de la revuo *Monumentum* li reprezentis la voĉon de la poezio, de la pacaagado kaj de unuiĝinta Eŭropo. Por sia poezia aktiveco li estis honorita per diversaj internaciaj premioj (premio Paestum kun la ormedalo de la prezidanto de Itala Respubliko, en 1963 kaj 1967, la arĝenta pokalo de la itala ministerio

pri publika instruado, dufoje li ricevis la Orajn Laŭrojn el Kapitolio, la Akademian palmon de la 500 ktp.). C. membris en dudeko da akademioj kaj literaturaj societoj. Dum 50 jaroj li aktive partoprenis la lokan kaj internacian skoltan movadon (inter alie 30 jarojn kadre de la sekcio San Vittore de Balerna). Li organizis pilgrimadojn al Lourdes, Fátima kaj La Salette. En la politiko C. agadis kiel municipiano (1945-49) kaj kiel komunuma konsilisto (1952-55 kaj 1960-71). En 1977 iu strato en Balerna estis nomita laŭ lia nomo.

C. simpatiis kun la idistoj, aperigante Ido-poemojn en sia revuo *Monumentum* kaj premiante tiajn en konkurso de li organizita.

### **Hans CORNIOLEY**

1896-1977



C. estis instruisto en la svisa lernejo en Luino (Italio, 1917-22) kaj en Berno (1922-48). Li studis muzikon, filologion kaj pedagogion en la berna universitato kaj 1948-58 estis sekretario de la urba lerneja direkto en Berno (pensiita en 1959). Pro siaj verkaĵoj pri literatura kritiko li ricevis en 1962 la literaturan premion de la urbo Berno kaj la svisan junularan libropremion. C. prezidis plurajn bernajn kaj svisajn societojn kaj estis konata kiel aŭtoro de diversaj artikoloj, studoj, ekspertizoj kaj kritikoj filologiaj, literaturaj, muzikaj, pedagogiaj kaj psikologiaj. Lia voĉo estis aŭdebla ĉe Radio Bern (Beromünster). Li estis adepto de la modera minuskligo de la germana ortografio kaj estrarano (1962-67) de bund für vereinfachte rechtschreibung.

Sed li tradukis ankaŭ el la itala lingvo, donis kursojn pri la berna dialekto kaj la lingvoj finna, franca, germana, itala, rusa kaj retoromanĉa. Por ĉi-lastata lingvo li eĉ verkis vortaron.

Pro pacismaj konsideroj kaj lingva intereso C. intimiĝis kun la neŭtrala universala lingvo en 1915. Ĉar Eon li malaprobis pro ĝiaj supersignoj kaj la akuzativo, li serĉis la kontakton kun la idistoj, al kiuj li restis dumvive lojala. Dum sia restado en Italio (1917-22) C. ĉeestis la fondon de Itala Ido-Societo, kaj post la reveno al Svislando la Ido-instruisto kaj Ido-‘konsulo’ plenumis diversajn funkciojn: prezidanto de la berna Ido-grupo, prezidanto (ĉ. 1929-34) kaj sekretario-kasisto (1946-50) de SULI, sekretario de la Ido-akademio kaj lingva sekretario de ULI. 1937 ĝis ĉ. 1957/59 li estis prezidanto de ULI. En 1939 li organizis la Ido-kongreson en St. Gallen. Dank’ al liaj klopodoj kaj al la kunlaboro de alia grava svisa idisto, →Jakob Kreis, la ĉefa Ido-periodaĵo *Progreso* povis aperi dum la dua mondmilito. Por ĉi tiu revuo C. verkis legindajn kontribuadojn (ekz. ‘30 jari Ido 1907-1937’, n-roj 120 kaj 121/1938), redaktis *Linguala Suplemento* (1930-50aj jaroj) kaj aperigis en *Progreso* enciklopedieton pri la historio de la planlingvoj (‘Mikra Enciklopedio Mondolinguala’, en: *Progreso* 120/1938 - 3/1948). Flegante bonajn rilatojn kun diversaj institucioj, en 1946 li konvinkis la gvidantaron de la Svisa Nacia Biblioteko en Berno instali ‘mondlingvan arkivon’ kaj komencis verki sliparon. Dum Ido-renkontiĝo en 1961 (5a de aŭgusto) en Zuriko li faris prelegon pri kun la titolo ‘Pri Suisia’. Lia okulmalsano kaŭzis, ke la planita 7-lingva *Ido-vortaro* restis nekompleta (1a vol., Bern, Genève 1965; 2a vol. samloke 1966; 3a vol. samloke 1967). La sinteno de C. vidalvide de aliaj planlingvoj, precipe kontraŭ Eo, estis severa, eĉ rigida. Li ne hezitis publike montri sian malŝaton al Eo: ekzemple en *Berner Schulblatt* de 1928 li polemikis kontraŭ la akuzativo de Eo. Lia abomeno kontraŭ Eo atingis tiel altan gradon, ke en 1959 li eĉ postulis, ke Ido estu purigita de ĉiuj Eo-influo.

## Jules GROSS

1868-1937



G. (Josephus Mauritius Julius) estis la ano de fama valeza familio de juristoj origina el la berna kanto, translokiĝinta al Valezo dum la reformacio. Kiel filo de prefekto kaj tribunalestro en Martigny/VS G. mem sekvis la religian-eklezian vokon: Post la lernejoj en St-Maurice, Sion kaj Brig en Valezo kaj en la monaĥejo de Einsiedeln/SZ, en 1888 li eniris kiel novico la aŭgustenano konventon de Granda Sankta Bernardo, kie li restis ĝis 1894 (sekvis dua restado en 1898-1901). En 1893 li fariĝis diakono kaj sacerdoto. G. aktivis dum 30 jaroj kiel vikario-kanoniko en la valezaj komunumoj Vollèges, Martigny, Lens kaj Conthey. En 1923 li retiriĝis al Ecône (kie li grave akcidentiĝis kaj sekve mortis).

G. estis adepto de la katolika abstina movado, kiu en 1904 starigis la valezan abstinan ligan La Croix d'Or, sekcio de Katolika Abstina Ligo de Svislando. En ĉi tiu movado li plenumis propagandajn kaj administrajn taskojn, redaktis la periodaĵojn *La Ligue de la Croix*, *Le Réveil* kaj *La Croix d'Or* kaj eĉ kreis la abstinan Internacian Federacion Katolikan Crux (Milano 1913), kies sekretario li estis. Krome li estis membro de la Akademio Saint-Anselme d'Aoste. Sed li havis ankoraŭ aliajn interesojn: li simpatiis kun la skolta movado kaj interesiĝis pri radiestezio. De 1920 li esploris kiel arkeologo la prahistorion de centra Valezo (grotoj de Protheux/Saillon, Conthey k.a.), kie li trovis amason da objektoj, kiuj estis transdonitaj al la muzeo de Valère. Krom tio G. aktivis kiel bibliotekisto kaj instruisto pri retoriko, kaj li estis konata ankaŭ kiel franclingva lirikisto kaj dramisto, kiu estis distingita eĉ per ora medalo (1935) de la

Franca Akademio. Oni rakontis, ke li disponis telepatiajn kapablojn (ekzemple en korespondado kun samordenaj monaĥoj en Tibeto). La oficiala nekrologo nomis lin humanisto kaj poeto kun la animo de infano.




*La Psalmaro* de Jules Gross (1921)

Konante ankaŭ Volapük kaj Eo, G. preferis Idon. De 1913/14 li ludis aktivan movadan rolon, plenumante kelkajn gravajn taskojn kaj funkciojn en la Ido-movado. Li rolis kiel korespondanto kaj propagandisto, ĉefe lige kun abstinado, sed li okupis ankaŭ la oficojn de Ido-konsulo kaj -agento. En 1921 li partoprenis la 1an Ido-kongreson en Vieno. En sia propra regiono li fondis kaj prezidis la Valezan Ido-Societon (Sion 1917) kaj estis la sekretario de la svisa sekcio de Unio Katolika Idista (1920aj jaroj).

Unuavice G. elstaris kiel tradukanto de religia literaturo, precipe el la Nova Testamento kaj el la psalmoj (*La Psalmaro*), kaj kiel verkanto de dramoj (*Anciena Valezia*, *La deliro*), komedioj (*La kato botizita*, *Robinson Krusoe*), romanoj (*La ponto marveloza*),



legendoj-poemoj (*Alpi-Rozi*) kaj religiaĵoj (*Semajno Evangeliala*). Siajn tradukojn li sendis al papo Pio XI. kaj tiel konigis Idon al la plej altaj ekleziaj instancoj (1923). Aliaj verkaĵoj (ekzemple tradukoj el Molière kiel *Mediko kontrevole*) aperis en apartaj broŝuroj kadre de la kolekto Biblioteko Katolika Idista. Liaj eldonaĵoj estis presitaj precipe en Thaon-les-Vosges (Francio) kaj aliloke en eksterlando. G. ofte kontribuis al diversaj Ido-gazetoj (*L'Idisto Katolika*, *Progreso* k.a.). Inter liaj tradukoj menciindas ankaŭ la francigo de la lernolibro de →Arnold Schrag (*L'Ido sans maître*). La verkaĵoj de G. estas arkivitaj en la biblioteko de la hospico de Grand-Saint-Bernard kaj en CDELI.



Jules Gross, fotita de Paul André (1932) kaj desegnita en *Progreso* (1932)

G. bonvenigis lingvajn reformojn en Ido kaj entute pridubis la taŭgecon de la nomo Ido; preferante la nomon Latinido, li rikoltis la kontraŭstaron de la konservema idisto →Albert Noetzli en Zürich. Tamen pro lia lingvistika kompetento la Ido-akademio elektis lin membro (en 1931).

→Bibliografio

## Jakob KREIS-SCHNEEBERGER

1907-1968



K. estis diplomita librotenisto, kiu ekde 1931 laboris en eldonejo kaj presejo de ilustritaj ĵurnaloj (*Prensa Gráfica*) en Madrido (Hispanio). Post la reveno al Svislando (1936) lin dungis okcidentisvisa paperfabriko en Serrières/NE, kaj ekde 1943 li laboris kiel ĉeflibrotenisto de la ĝeneva ĵurnalo *Tribune de Genève*.

Idisto de 1925, K. kunfondis la zurikan Ido-klubon *Progreso* kaj la agentejon *Weltsprache-Agentur Zürich* (1927). Okaze de la Ido-kongreso en Zürich en 1928 li renkontis la filinon de →Friedrich Schneeberger, Clara (\*1907), kiun li edzinigis en 1933 en Madrido (ilia filino Carmen, \*1934, siaflanke edziniĝis kun la filo de konata hispana idisto). En Hispanio K. oficis kiel ĝenerala sekretario de Hispana Federuro dil amiki di la linguo internaciona, eldonis la hispanan Ido-revuon *Adavane* kaj reprezentis la hispanan Ido-movadon dum internaciaj kunvenoj. Devigata forlasi Hispanion pro la enlanda milito, en Svislando K. daŭrigis labori por Ido, enkondukante la 'svisan periodon' de la Ido-movado (ekde 1939). Dum la mondmilito li havis la taskojn de la sekretario kaj kasisto de ULI, ĉefredaktis kaj eldonis la internacian Ido-organon *Progreso*, kunlabore kun →Hans Cornioley. Post grava, sed dume kuracita malsano K. daŭrigis sian aktivecon kiel gvidanto de la sekretariejo de ULI en Genevo. En 1945 K. estis elektita prezidanto de SULI. Avancinta kiel membro de la Ido-akademio, 1958-61 K. denove ĉefredaktis la revuon *Progreso* kaj ĝis 1964 responsis ankaŭ pri la SULI-organo *Suisa Ido-Buletino*.

Post la morto de K. en 1968 lia vidvino *Clara Kreis-Schneeberger* (\*1907) daŭrigis la laboron por la Ido-movado, i.a. kiel estraranino de ULI (ĝis ĉ. 1991).

## **Albert NOETZLI**

1876-1940


Pri la profesio de Noetzli ekzistas kontraŭdiraj indikoj: eble li plenumis la profesion de tipografo, sed laŭ A. Matejka en *Cosmoglotta* 192, p. 35, li estis lokomotivestro en Zuriko. Sur la titolpaĝo de la gazeto *Idano* estas notita la mallongigo 'math.,' kio supozeble signifas matematikiston.

Instige de la 2a UK en Ĝenevo (1906) N. lernis Eon kaj ekaktivis kiel (diplomita) Eo-instruisto. En 1908 li transiris al la Ido-movado, en kiu li ludis elstaran rolon. Li verkis la unuan Ido-lernolibron aperintan en pluraj eldonoj kaj adaptitan al aliaj lingvoj, instruis Idon kadre de la zurika Ido-societo Progreso (kiun li estris). Li estis prezidanto de Suisana Unio por la propagado de la lingvo internaciana, sekretario de la zurika Weltsprache-Verein/Klubo de mondlingvo (1912) kaj de Suisiana Ido-Societo. Li lanĉis la periodaĵon *Suisian Idisto* (1917-22), la oficialan organon de la svisa Ido-societo, mastris propran Ido-presejon en Oerlikon/ZH kaj ofte prelegis publike en diversaj urboj. Post la malapero de tiu revuo en 1922, li anstataŭigis ĝin per la pli internacia bulteno *Ido* (ĝis 1929). Kiam en 1924 Suisa Mondlingual Societo estis fondita, N. disponigis sin kiel sekretario-kasisto. La saman oficon li okupis en la posta Suisa Ido-Federuro (fond. 1926).

La eksplodo de akraj diskutoj inter konservemaj kaj reformemaj idistoj dum la 7a internacia zurika Ido-kongreso en 1928 kaj la transiro de parto de la progresemoj al Occidental rezultigis disiĝon en la Ido-movado. Dum N. restis fidela al Ido kaj kiel reprezentanto de la konservema branĉo kondamnis ĉiujn neloyalajn idistajn samideanojn, kiuj esprimis diverĝan opinion, li kreis la novan organon Unio Idista. N. deĵoris ankaŭ kiel kasisto de la Ido-

akademio kaj kiel redaktoro de ĝia *Oficiala Informilo*.

→ Bibliografio (foton vd. en la bilda parto en la mezo de la enciklopedio)



Lernolibro de Noetzli aperinta en Zürich en la jaro 1908



Broŝuro eldonita de Noetzli pri la mondlingvo kaj Ido

## **Marcel PESCH**


1893-1970

P. estis franco, kiu loĝis en Verrières-le-Buisson (Seine et Oise, Francio), kiu laboris kiel stenografo-tradukisto ĉe Ligo de Nacioj, ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko, ĉe la Franca Nacia Asembleo kaj ĉe la Internacia Laboroficejo en Ĝenevo.

Konata ankaŭ sub la pseŭdonimoj *Marcelo Persiko* kaj *Defirs*, P. okupiĝis unue pri Volapük, poste pri Eo kaj transiris al Ido kiam tiu reformlingvo aperis. Sekve li agadis kiel redaktoro kaj eldonisto de Ido-revuoj dum la 20aj jaroj (*Idista Edukero*, Ĝenevo 1921-22; *Defirs*, magazina revuo, Ĝenevo 1922; *La Jurnalo Internaciona en Ido*, Ĝenevo 1929-30). Aliloke aperis liaj periodaĵoj *La Langue Internationale* (Paris 1957), *Por e kontre* (Paris 1938), *La jurnalo dil intelekto* (Örebro 1938). Dank' al lia tiama funkciado kiel stenografo ĉe la Internacia Laboroficejo en Ĝenevo, la organizo permesis uzi Idon kiel korespondlingvon kaj konsentis okazigi Ido-kursojn. P. kunlaboris kun la redaktoro de *Suisian Idisto*, estis kooptita Ido-akademiano kaj inventis propran kursivan Ido-stenografion. Lia plej grava verko, la 632-paĝa *Diccionario de la 10'000 radiki di la linguo universala Ido*, aperis en 1964. Iam eksperimentinte per propra lingvoprojekto (Espido, 1923), en letero de la 6a de junio 1967 li klarigis, ke li skizis ĝin nur por demonstri, ke verdire eblas facile krei internacian planlingvon, kaj deklaris sian fidelecon al Ido. Kvankam P. estis fervora Idisto (nomata „Idisto maxim Ido-textifera“), lia skeptiko pri tiu lingvo neniam malaperis. Laŭ ies komento en *Suisa Ido-Buletino* (1950) li eĉ bojkotis ULI kaj ties organon *Progreso*, kiu en 1931 riproĉis al li kaj ties kunlaboranto Baxter „lingvan fanatikon“.

## **Friedrich SCHNEEBERGER**

1875-1926



Post la gimnazio kaj teologiaj studoj en la berna kaj strasburga universitatoj S. aktivis kiel protestanta pastoro ok jarojn en Laufen (urbo tiam apartenanta al la berna kantono) kaj dekok jarojn en Lüsslingen/SO, protestanta vilaĝo en katolika kantono. Sub la premo de liaj kritikantoj en Lüsslingen, kiuj riproĉis al li maldecan konduton kaj neglektadon de la ekleziaj taskoj, S. estis taksita maltaŭga por la eklezia posteno, tiel ke li devis rezigni pri sia posteno kaj en 1925 estis eksigita el la pastora funkcio. Sekve li eklaboris kiel stenografo (Stolze-Schrey) en la soloturna kantona konsilio kaj pli malfrue okupis similan postenon en la federacia parlamento en Berno. Baldaŭ en marto 1926 li forpasis.

Jam en sia lerneja aĝo S. entuziasmiĝis pri la ideo de neŭtrala universala lingvo kaj en 1887/88 studis Volapükon. En 1903 li eksciis pri Eo - ankaŭ lia samnoma patro (1843-1906), konata muzikisto, muzikdirektoro kaj verkisto de popolkantoj kaj -operoj, estis fervora e-isto. Sekve ankaŭ la filo movade aktiviĝis kaj eĉ fariĝis prezidanto de Svisa Eo-Societo (1904-08). En 1905 S. partoprenis la 1an UK en Bulonjo-sur-Marco (Francio). En 1906 li prezidis la 2an UK en Ĝenevo. Krome li verkis diversajn Eo-lernolibrojn, kunlaboris kun la redakcioj de *Tra la Mondo* kaj *La Revuo* kaj membris en la Lingva Komitato (kiu pli malfrue eksigis lin).

S. estis konsiderata kiel pioniro en stenografio, ankaŭ esperanta. En 1903 li aperigis kvarpaĝan *Resumon de la esperanta stenografio*, verkitan laŭ la sistemo de

Stolze-Schrey. Dua kaj tria eldonoj de la sama resumo, kun kelkaj sistemmodifoj, eliris ĝis la jarfino. S. fondis la esperantan rondon por praktikadi kaj ekzercadi la stenografion. Li verkis kaj eldonis laŭ la stenografiaj notoj la raporton, aperintan en Laufen, pri la 1a UK en Bulonjo-ĉe-Marco (1905) kaj postskribis ankaŭ la oficialajn paroladojn de la 2a UK en Ĝenevo laŭ la sistemo Stolze-Schrey. Samjare aperis lia lernolibro de stenografio. En 1906-08 S. redaktis la organon de la Eo-stenografoj *Flugila Stelo*. (→Stenografio)

En 1908, okaze de la Ido-skismo, S. senkulpiĝis por la SES-jarkunveno kaj anoncis, ke li transiris al la Ido-movado. Demisiinte kiel SES-prezidanto kaj forlasinte la Eo-movadon (li ne tute rompis siajn rilatojn kun la e-istoj), li daŭrigis sian planlingvan agadon ĉe la idistoj. En tio cetere li estis helpata de sia frato Paul, kiu mem fondis kaj prezidis la Eo-grupon de Biel-Bienne, pli poste la samurban Ido-grupon (1910). S. verkadis kaj eldonadis diversajn lernilojn kaj propagandilojn, funkciigis la Ido-konton en Lüsslingen kaj en 1909 fondis kun →Anton Waltisbühl kaj Richard Lorenz en Zürich la Ido-organizon SULI, kies sekretario (1911-22) kaj prezidanto (1924-26) li fariĝis. En 1909 S. membriĝis en la Ido-akademio (responsulo pri lingvaj demandoj en *Suisian Idisto* kaj en *Progreso*) kaj en 1911 elektiĝis kiel ĝia prezidanto, post la demisio de Otto Jespersen. Ĝis 1920 li membris en la direkta komitato de Unio di l'amiki di la lingvo internacia kaj oficis kiel sekretario de la Idista Unio. 1910-14 li redaktis la bultenon *Idano* (poste *Die Weltsprache*), aŭtoris proksimume 150 artikolojn por la Ido-gazetaro kaj en 1908/10 prizorgis la internacian rubrikon en *Solothurner Zeitung*. En internaciaj Ido-kongresoj S. plenumis gravajn funkciojn: prezidanto de la Ido-kongresoj en Vieno (1921) kaj en Torino (1925), honora prezidanto en Dessau (1922), ĝenerala sekretario en Kassel (1923), vicprezidanto en Luksemburgo (1924). Kun intereso S. observis la aktivecojn de IALA kaj deĵoris kiel sekretario de →Verband für die Schaffung eines Weltsprache-Amtes, fondita en 1911 en Berno.

Post la frua morto de S. lia laboro estis daŭrigita de lia filino *Clara Kreis Schneeberger* (\*1907) kaj de ties edzo →*Jakob Kreis* (1907-68).

→Svisa Esperanto-Societo →Bibliografio

→Universalaj Kongresoj de Esperanto (Ĝenevo 06)

## **Arnold SCHRAG**

+1934


La inspektoro (kun doktora titolo) en la duagrada lernejoj de la berna kanton estis gajnita por la internacia lingvo en 1910 per prelego pri la temo 'La organizado de la mondo' de la germana nobelpremiito Wilhelm Ostwald (1853-1932), kiu simpatiis kun la Ido-movado. Sekve Schrag aliĝis al Ido. En la kalendaro 1/1913 de la periodaĵo *Die Weltsprache. Monatsschrift für die Internationale Hilfssprache 'Ido'* (1911-12 titolata *Idano*), eldonita de →Friedrich Schneeberger en Lüsslingen/SO, S. rakontis kiel de kontraŭulo li fariĝis amiko de la mondlingvo kaj kial li proklamis la superecon de Ido.

Tiun eldonejon S. utiligis por publikigi diversajn Ido-lernilojn por germanlingvanoj. Kadre de Weltsprache-Verein Bern, kiu estis fondita en aprilo 1913, S. rolis kiel estrarano. Okaze de la 9a UK de UEA en Bern en 1913 S. klopodis saboti la mondkongreson, sendante leteron al la aŭtoritatoj de ŝtato, kanton kaj urbo kun la alvoko, ke oni rezignu sendi oficialan reprezentanton al la UK. En junio 1928 S. prezidis interlingvistikan konferencon en Bern, kie estis diskutitaj kun la idistoj diversaj problemoj de la neŭtrala universala lingvo. Post kiam Schrag engaĝiĝis diversmaniere en la berna regiono por Ido, li transiris al la Occidental-movado en 1928.

→Antologio

## Anton WALTISBÜHL

1855-1940



Laŭ iuj indikoj W. estis negocisto-komercisto pri officejaj varoj en Zürich. Kiel planlingvano W. estis unika personeco. Unue li engaĝiĝis en la Volapük-movado, fondante en 1887 la Volapük-klubon en Bremgarten/AG. En 1888 li helpis kiel kasisto al la estraro de Volapükaklub jveizik, t.e. Svisa Volapük-Societo, respektive al ties prezidanto Jakob Walser. Kiel e-isto W. verkis la lernilon *Kompleta lernolibro por E-istoj* (Zürich 1908). Poste W. transiris al Ido, kunfondis la Agadkomitaton por la propagando de Ido en Svislando (1908), kies unua prezidanto li fariĝis, kaj starigis la organizon Societo por la lingvo internacia (Weltsprache-Verein) en Zürich. Krome li estis sekretario-kasisto de Unio di l'amiki di la lingvo internacia, kunfondinto de SULI, estro de la kursoj de Akademial Mondlingual-Societo en Zürich, partoprenanto en Ido-kongresoj kaj kunlaboranto de →Friedrich Schneeberger.  
→Volapük

### **VERBAND FÜR DIE SCHAFFUNG EINES WELTSPRACHEAMTES**

Ĉi tiu *Asocio por la starigo de Universal-lingva Officejo* estis kreita la 27an de februaro 1911 en Berno (Svislando) post konkretaj sugestoj de la eminenta profesoro Wilhelm Ostwald (1853-1932), sekreta konsilisto el Leipzig (Germanio) kaj nobelpremiito pri kemio (1909). Ostwald, kunlaborinto de la Delegitaro por alpreno de internacia helplingvo, prelegis en septembro 1910 pri la temo 'La organizado de la mondo' (Basel)


kaj pri 'La energia principo en komerco kaj metio' (Bern) kaj altiris la atenton de la interesata publiko pri la universala neŭtrala lingvo. Li evidente plej simpatiis kun la lingvo Ido, okupante la oficon de honora prezidanto de Unio di l'amiki di la lingvo internacia.

La ĉefa celo de V. (franclingve Association pour la création d'un bureau de la langue internationale) konsistis en la klopodo prepari la vojon por la enkonduko de neŭtrala universala lingvo tra la kunlaboro kun la diversaj registaroj aŭ registaraj instancoj kaj instituciigi la mondlingvan aferon tra la politiko. Unuavice oni vidis la svisan registaron kiel taŭgan neŭtralan instancon, kiu povus preni la iniciativon por okupiĝi pri la mondlingva demando. La 14an de novembro 1910 en Berno kunvenis la t.n. iniciata komitato sub la prezido de d-ro Adolf Thürlings (1844-1915), katoliko, kiu post sia elpelo el la roma eklezio (1870) fariĝis krist-katolika pastro kaj ordinara profesoro pri sistema teologio en la berna universitato. La juristo Arist Rollier, tiam oficanta sekretario de la Supera Tribunalo, faris enkondukan prelegon pri la fonda historio de internaciaj oficoj. La V. elektis jenan estraron: kolonelo →Emil Frey, prezidinto de la Svisa Konfederacio kaj direktoro de la Internacia Officejo de la Telegrafia Unio en Berno (honora prezidanto), d-ro Albert Gobat, membro de la svisa kaj kantona parlamentoj kaj direktoro de la Internacia Pacburoo en Berno (prezidanto), prof. Wilhelm Ostwald, →Anton Waltisbühl kaj Aristide Rollier (vicprezidantoj). →Friedrich Schneeberger kaj H. Behrmann, direktoro de la Oficiala Informburoo en Berno, fariĝis sekretarioj, Eugen v. Büren-v. Salis, bankisto, kaj Ernst Witschi ricevis la oficon de kasisto. Inter la membraro troviĝis diversaj aliaj personecoj, precipe el Berno. Laŭ la statuto V. komprenis sin kiel internacian asocion kun la celo prepari diplomatan agadon por establi Universalan Lingvan Union inter la diversaj nacioj kaj por krei Universalan Lingvan Officejon, kiu devus zorgi pri la enkonduko, evoluigo kaj aplikado de oficiale rekonita universala neŭtrala lingvo. Tiucele ĉi tiu officejo intertraktis la internacilingvan demandon kun mondlingve neŭtralaj

organizoj en Svedio kaj Nordameriko kaj kun la svisa registaro kaj la sekretario de →Ligo de Nacioj en Ĝenevo.

La 17an de oktobro 1911 prezidanto Gobat povis aranĝi privatan aŭdiencon ĉe federacia konsilisto Josef Anton Schobinger (1849-1911), kiu gvidis la Svisan Departementon pri internaj aferoj. Laŭ la raporto de V. pri la jaro 1911 la nomita ministro simpatie rilatis al la afero de la neŭtrala universala lingvo, rekomendis pli detale informi la svisan registaron pri la laboro de V. kaj promesis, ke la afero estos bonvole ekzamenata. Bedaŭrinde Schobinger forpasis unu monaton poste. Kun dato de la 31a de decembro 1911 V. publikigis projekton de memorando al la svisa registaro, per kiu oni submetis kriteriojn por pravigi la enkondukon de neŭtrala universala lingvo kaj prezentis la ambician laborprogramon por 1912 kun internacia disradiado. Nek Eo nek Ido estis menciitaj. Deklarante sian neŭtralecon, V. emfazis, ke ĝi akceptis reprezentantojn de la plej diversaj planlinvoj kiel Bolak, Eo, Europal, Ido (Reform-Eo), Latino sine flexione, Neutral (Reform-Neutral), Pankel, Perfect, Romanal, Tutonish, Viva kaj Volapük. Juĝante laŭ la membro-listo de V., oni facile povis malkovri la internacian idistaron (kun eksaj e-istoj) kiel motoron de tiu projekto. La verkantoj de la jarraporto 1912 konfesis, ke la koncernaj politikaj instancoj ne povus formi definitivan juĝon, ĝis kiam la situacio rilate la elekton de konkreta universala planlingvo ne estos klara. En la kvina numero 1913 de *Die Weltsprache* oni anoncis la refondon de *Weltsprache-Verein Bern* je la 5a de aprilo sub la prezido de iu Hans Christen kaj →Arnold Schrag kiel estrarano. Ĉar en tiu ĉi jaro okazis ankaŭ la 9a UK de UEA en Berno, la idistoj evidente iĝis tre nervozaj kaj komencis agi kontraŭ la kongreso kaj la e-istoj. En la naŭa numero de *Die Weltsprache* estis publikigita la kongresa festparolado de →Emil Frey, kiu en sia alparolado varme bonvenigis la ideon de la neŭtrala universala lingvo kaj laŭdis la kongreson.

→Universalaj Kongresoj de Eo →Antologio



Titolpaĝo de broŝuro en la germana kaj angla lingvoj

### **Franz ZIMMERMANN**

1899-1951



Z. estis presisto, tipografo, kompostisto kaj korektisto kaj agadis en diversaj socialaj, kulturaj kaj politikaj organizaĵoj. Ankaŭ li apartenis al la fruaj adeptoj de Ido kun diplomo, kiun li ricevis dum la unua internacia Ido-kongreso en Vieno en 1921. Kiel Ido-konsulo, -kursestro kaj prezidinto de la Ido-grupo (Ido-Federuro) en St. Gallen li kunorganizis la internacian Ido-kongreson en sia urbo (1939) kaj reprezentis la svisojn dum la Ido.-kongreso en Colmar (1950).